# Kubo kaj Esperanto

Esperanto aperis en Kubo komence de la 20-a jarcento. En la jaro 1959, do sub la novaj kondiĉoj de la Kuba revolucio, la lingvo komencis disvastiĝi tra la tuta lando kun granda sukceso. Poste oni kreis la *Kuban Esperanto-Asocion* (KEA) en 1979, kiu aliĝis al la *Universala Esperanto-Asocio* (UEA) en la jaro 1983. La kunlaboro inter la asocio kaj diversaj registaraj institucioj ebligis gravajn sukcesojn, kiel la eldonon de Esperantaj libroj pere de la eldonejo José Martí, la semajnajn radioelsendojn en Esperanto ĉe *Radio Havano Kubo*, la organizon de la *75-a Universala Kongreso* kaj de la *46-a Internacia Junulara Kongreso* en Kubo, en 1990, kelkajn kultur-festivalojn, seminariojn pri aplikado de Esperanto en scienco kaj teĥniko.


Havano

Komence de la jaro 2002, KEA realigis sian 4-an nacian kongreson, en kiu partoprenis kubaj kaj eksterlandaj Esperantistoj. La partopreno de KEA en la *Internacia Libro-Foiro de Havano* ekde ties komenco kontribuis al la disvastiĝo de Esperanto ĉe la kubaj amaskomunikiloj kaj ties publiko.

Komence de la jaro 2002, KEA realigis sian 4-an nacian kongreson, en kiu partoprenis infanoj de preskaŭ la tuta lando. La sekva okazis en Bajamo.

95a Universala Kongreso de Esperanto
Havano, 17–24 julio 2010

KEA organizas regulajn kaj perkorespondajn kursojn de Esperanto. En la nacia sidejo oni organizas seminariojn, laborrondojn kaj konferencojn, en kiuj partoprenas ankaŭ eksterlandaj gastoj.

En la jaro 2004, KEA gastigis la *6-an Tutamerikan Kongreson de Esperanto*, kiu dum semajno akceptis 200 esperantistojn de la kontinento kaj de kelkaj eŭropaj landoj. En marto 2005, KEA organizis sian 5-an nacian kongreson.

★

*En 2010 Kubo estos denove la ĉeflando de Esperantujo. Kubaj esperantistoj ĝoje akceptos vin en julio ĉe la Universala Kongreso en Havano aŭ en la ILEI-konferenco en Matanzas.*



## TUTMONDA FABELKONKURSO 2009 EN ESPERANTO

Bedaŭrinde alvenis nur 6 verkoj (el Pollando kaj Rumanio).
De nun oni organizos ĝin nur ĉiun duan jaron.
Ĉi-sube ni prezentas al vi la verkon de pola lernanto *Jakub Lewak*,
kies fabelon la ĵurio trovis plej interesa.

Antaŭlonge en valo staris belega kastelo. En tiu kastelo loĝis granda reĝo. Li nomiĝis Adamo. Tage kaj nokte en la tuta kastelo brilis ĉiuj lumoj, ĉar la reĝo timis mallumon. En ĉiuj ĉambroj ŝaltitaj estis la televidiloj, kaj en la koridoroj sen paŭzo funkciis radioaparatoj, ĉar la reĝo sentis sin tre soleca.

Tamen ne permesite estis al li vivi trankvile, ĉar iun tagon teruraj robotoj ĉirkaŭis lian kastelon. Ili estis senditoj de reĝo Petro de najbara lando. Kiam la reĝo, kiel ĉiutage, eliris el la kastelo por promeni, kaj ekvidis ilin, li tre timiĝis. Li komencis pensi, kion ili volas de li. Tiam subite li aŭdis laŭtan voĉon: “Reĝo Adamo, ne plaĉas al ni, ke tiel multe da kurento vi eluzas. En nia lando ĉio ĉesas funkcii. Ni estis senditaj ĉi tien por vin admoni kaj kontroli, ĉu vi ĉesos malŝpari energion.”

La reĝo gratis al si la kapon kaj diris:



– Sed ja tio ĉi estas al mi ĉiutaga bezonaĵo. Kaj lumo kaj televidilo kaj radioaparato.

– Ni komprenas tion – respondis ili – sed ni venis lernigi vin, kiel utiligi tion saĝe. Tage vi ne bezonas lumon, ĉar brilas la suno. Vi povas ĝin ŝalti je la krepusko, kaj nur en tiu loko, kie vi estas, ne en la tuta kastelo. Kaj post enlitiĝo la lumo ne plu estas al vi bezonata. Oni povas malŝalti ĉiujn lumojn, kaj ŝalti nur etan noktan lampeton.

– Vi pravas – konsentis la reĝo. – Sed kio kun miaj televidilo kaj radioaparato? En mia kastelo estas tiel silente…

– Nenio povas anstataŭi al vi renkontojn kun amikoj. Parolu kun homoj.